Christian Morgenstern,

# [Febla korp']

*tradukita de Willy Nüesch*

Febla korp', vi nur eltenas,
kion mi kulpadis iam,
disfaleta dom', vi trenas
vin al tombo pli kaj pli jam,
mi ne volas do riproĉi,
ke tre pezas en vi loĝi.

Al ni du necesis pento,
tial ni nin unu plektis,
sur piedo de la vento
ni posedo nin elektis.
Unu vidis la alian,
kaj jen migris unu ni jam.

Kaj jam staris celo nia
antaŭ ni: suferi, plori
devos unu per l' alia,
unu per l' alia flori:
ke el niaj am' kaj lukto
ĝermu nova vivofrukto.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "[Schwacher Leib]" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-138-276 (2013-08-28 18:45:43)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net". Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*